

sub la suda kruco ★
marto 2016

ESPERANTO



ESPERANTO SUB LA SUDA KRUCO

OFICIALA ORGANO DE LA AŬSTRALIA KAJ NOV-ZELANDA ESPERANTO-ASOCIOJ

Volumo 24 [1] numero 122 marto 2016

Presita de CMYK Colour Online en Melburno, Aŭstralio
Redaktistoj: David Ryan, Joanne Johns
Kontaktadreso | esk2@esperanto.org.au

AEA - ESK
G.P.O. Box 2122
Melbourne, Victoria 3001
Aŭstralio

Abonoj & Pasintaj Numeroj

Esperanto sub la Suda Krucio estas sendata al membroj de la Aŭstralia Esperanto-Asocio (AEA) kaj Nov-Zelanda Esperanto-Asocio (NZEa).

Por informoj pri abonoj, pasintaj numeroj, kaj pri membriĝo al la asocioj:

AEA | www.esperanto.org.au – info@esperanto.org.au
NZEa | www.esperanto.org.nz – exec@esperanto.org.nz

Kiel kontribui al ESK

Sendu eseojn, ideojn, rakontojn, esprimojn de vidpunkto, leterojn, desegnaĵojn, fotojn, kaj iun ajn alian originalan kontribuon al nia kontaktadreso, esk2@esperanto.org.au

Limdato por kontribuoj por la sekva numero

15-a de junio 2015

La redaktoroj rajtas redakti, korekti, mallongigi kaj konformigi al la stilo kaj kutimo de ĉi tiu gazeto ĉiujn tekstojn antaŭ aperigo.

Por la opinioj aperantaj
en ĉi eldonaĵo respondecas la aŭtoroj.
Ili ne necese spegulas la opiniojn
aŭ de AEA aŭ de NZEA.

Copyright © 2015 AEA & NZEA – ĉiuj rajtoj rezervitaj
ISSN 1038-9380.


SUR LA KOVRILO: Bela aŭstralia papago - la Skvambrusta Lorikito




5. Pensoj pri la estonteco



6. Pri la “ri”



9. La vivstilo de plantoj



12. Gramatikaj aspektoj de Esperanto




16. La bushaltejo



18. Ajna krucvortenigmo



20. Recenzo: *Lingo: A language spotter's guide to Europe* de Gaston Dorren



22. Populara pola popolfabelo malnova verkita de mi mem



26. Recenzo pri la libro *Tra la Lando de Kanguruoj* de Tibor Sekelj



27. Nur alportu vin mem

Dum decembro kaj januaro mi pasigis preskaŭ ok semajnojn kun mia bo-familio en Meksikio. Mia edzino estas meksikianino kaj, pro tio, ni ofte vizitas Meksikion kaj ni restas ĉe ŝiaj gepatroj. Dum tiu tempo ni ĉiuj parolis en la hispana kaj mi preskaŭ neniam parolis la anglan. Fakte, mi parolis pli ofte en Esperanto ĉar mi vizitis esperantistajn amikojn. La movado en Meksikio, kvankam relative malgranda, pli vigliĝas kun pli da novaj, junaj membroj.

Mi ĝojas ĉar finfine venis reagoj al unu el niaj artikoloj kiuj aperis en la pasinta numero de *Esperanto sub la Suda Kruco* (ESK) kie la verkinto de la artikolo uzis 'ri' por 'li kaj ŝi'. Marcel Leereveld komentas: "Se mi ne scias ĉu iu ŝtelisto estas viro aŭ virino, mi diras 'li aŭ ŝi' aŭ 'ŝi aŭ li' kaj 'mi ne vidis ŝian aŭ lian vizaĝon'. La angla nuntempe solvas ĉi tiun problemeton uzante 'ilia' eĉ por la singularo: 'the man or the woman lost their hat'. Sed aliaj lingvoj kaj Esperanto simple diras 'mi trovis ŝian aŭ lian ĉapelon'. Tute ne ekzistas problemo: mi solvas tion uzante ekzistantajn kaj oficialajn vortojn." Vera Payne demandas kial ne ŝ/li (malpli da literoj kaj nur unu silabo)? Aperas sekve ankaŭ artikolo de David Rockell pri ĉi tiu gramatika temo. Mi dankas al Marcel, Vera kaj David pro iliaj komentoj.

Eble ĉi tiu estos la lasta numero de ESK – domaĝe, precipe pro la fakto ke, per via membra kotizo, vi pagas por ricevi ESK. ESK estas via revuo kaj bezonas viajn kontribuojn. Do, se donas al vi plezuron regule trovi ESK en via poŝtkesto, savu ESK! Sendu kontribuojn en Esperanto, aŭ eĉ en la angla pri Esperanto, aŭ sendu fotojn ktp. Se ni ne regule ricevos artikolojn, ESK malaperos. Ne gravas la temo: ĉu via klubo diskutis pri interesa temo? ĉu vi ĉeestis Esperanto-kongreson? ĉu vi volas rakonti pri viaj ŝatokupoj, aŭ pri gravaj aferoj kiel, ekzemple, klimata ŝanĝiĝo? Ek nun al verkado!



Kion faras ĉi tiuj meksikaj infanoj? Kial ili rigardas supren? Kia stranga meksikia tradicio okazas? Divenu! Sendu viajn sugestojn al esk2@esperanto.org.au.

Pensoj pri la estonteco

BOB FELBY (ADELAJDO)

Iam estis viro kiu preferis pensi nur pri si kaj ankoraŭ hodiaŭ estas tia viro, aŭ eĉ pli bone tiaj viroj, eble ankaŭ virinoj. Ili estas membroj de la homa raso sed okazas ke ili, de tempo al tempo, erare kredas ke ili membras en tute alia raso malsama al la homa. Tio estas ilia eraro. Ni ĉiuj eraras ĉar neniuj estas perfekta!

Sed ili kredas sin bonaj kaj tio estas ja io. Ili iras, kelkfoje, al sia loka preĝejo proksima al sia loĝloko. Eble tio estas la kialo kial ili sentas sin pli bonaj ol la plej multaj aliaj homoj. Ili havas unu el la multaj Sanktaj Skriboj en sia hejmo. Okazas, sed kompreneble nur tre malofte, ke ili iomete legas en tiuj Skriboj. Necesas diri ke ili ne ĉion komprenas.

Sed vi kaj mi ja bone komprenas, ĉu ne? Same kiel ni ankaŭ ili loĝas sur ĉi tiu planedo nomata Tero. Eble ĉar ĝi konsistas el tero. Nu, eble mi devas bedaŭri ke mi ne scias la nomojn de tiuj homoj, sed ĉu nomoj tiom gravas? Eble jes, ĉar mi persone tre ŝatas mian nomon kvankam mi ofte forgesas ĝin. Do eble ankaŭ tiuj homoj tre ŝatas siajn. Sed, se ili iam legos ĉi tion, kion mi dubas, ĉar ili certe ne estas esperantistoj - mi esperas ke ili pardonos min, ĉar mi ne scias iliajn nomojn.

Sed ankaŭ ili ja loĝas sur tiu ĉi planedo, kiu ankoraŭ estas bona

kaj bela. Sed bedaŭrinde tio ne daŭros tre longe, ĉar troviĝas sur Tero malgranda aro da homoj, kiuj intencas malpurigi ne nur Teron, sed ankaŭ ĉiujn marojn, riverojn kaj lagojn per veneno kaj aliaj malpuraĵoj. Ili faras tion por sin pliriĉigi. Ili jam estas sufiĉe riĉaj por facile povi pagi ekzemple siajn elektrofakturojn kaj aliajn fakturojn kiuj ankaŭ estas multe tro altaj por ordinaraj homoj. Sed tiuj riĉuloj pro sia riĉeco grave influas la registarojn kiuj faras ĉion por plaĉi kaj plezurigi la riĉulojn. Tio estas la kialo kial riĉuloj ne pagas impostojn. Tion faras nur malriĉuloj. Kaj la riĉuloj imagas al si ke ili meritas tion!

Sed bedaŭrinde por ili, ili tute ne scias, ke ekzistas justeco en la universo. La riĉuloj ŝajne tute ne komprenas ke troviĝas vivo ankaŭ sur ĉiuj aliaj planedoj. Kaj ke iam ili mem loĝis sur kelkaj el ili, kaj ankaŭ ke ili poste vivos sur kelkaj el la aliaj. Sed io kion ili eĉ tre bone komprenas, estas ke oni ne povas elpreni el la bankoj ion kion oni ne antaŭe enmetis en ilin. Sed tiu sama regulo regas ankaŭ por ĉiuj aliaj aferoj.

Momente nia Tero estas en granda danĝero. Ĝiaj surloĝantoj riskas sian vivon ĉiun tagon. Rabobestoj kaj rabobirdoj mortigas kaj manĝas

pacamajn bestojn kaj birdojn. La plej multaj homoj ĉasas, mortigas, kaj manĝas ne nur rabobestojn kaj rabobirdojn sed eĉ bredas sendefendajn bestojn kaj birdojn nur por grasigi, mortigi, kaj vendi ilin kvazaŭ tiuj naskiĝis nur por nutraĵo de homoj. Tio estas alia eraro de ni tiel nomataj homoj. Iuj, verŝajne tre naivaj homoj, kredas ke ĉasado kaj fiŝmortigado estas nobla sporto. Ĉasi, terurigi, kaj mortigi senhelpajn kaj senkulpajn bestojn ili konsideras noble. Kiom stulta oni rajtas esti? Multaj homoj eĉ surmetas malbelajn vestaĵojn, tiel nomatajn uniformojn, kredante ke tio rajtigas ilin eniri flugmaŝinojn kaj flugi al fremdaj landoj por disĵeti bombojn sur senkulpajn infanojn, dorlotbestojn, gemaljunulojn, gemalsanulojn ktp. ktp. Ili eĉ detruas ne nur malsanulejojn, lernejojn, sed ankaŭ la hejmojn de la senkulpa loĝantaro. Ili tute ne pensas pri la fakto ke ne la ordinara homoj kulpas. Kulpas nur iliaj registaroj kaj aliaj riĉeguloj, ĉu ne? Ili revenos hejmen por esti honorataj per medaloj kaj aliaj senvaloraĵoj, nur Dio scias kial. Ĉu tiu malamemo kaj frenezeco regos por ĉiam?

Sed danke al la agoj de la riĉuloj tio espereble baldaŭ ĉesos. Helpe de la registaroj tiuj riĉuloj iom post iom sukcesos senvivigi Teron. Estas klare, kompreneble, ke la avideco de la riĉuloj okazigos la morton de ni ĉiuj. Estas jam klare ke eĉ tre baldaŭ la

vivo estingiĝos en niaj maroj, riveroj, kaj lagoj. Ni ĉiuj scias kiuj kulpas pri tio, ĉu ne? Sed tio sama okazos ankaŭ tre baldaŭ al la surtera vivo sur Tero. Unu kompanio transprenos la alian. Tiel estos ĉiam malpli kaj malpli da kompanioj surtere. Poste troviĝos nur unu kompanio, kies ĉefo konsideros sin grava kaj influriĉa. Sed ĉu li estos feliĉa? Pro sia fia fiereco li ekmaldungos unu post la alia el siaj gedungitoj. Tiuj estos senlaboraj. Ili ne plu havos sufiĉan monon por eliri kaj aĉeti manĝaĵon kaj vestaĵojn. Kaj tio kaŭzos la finon de la diversaj vendejoj. La vendistoj mortos pro malsato ktp. Tre baldaŭ restos nur unu homo sur Tero. Ĉiuj aliaj mortis pro lia – aŭ ŝia – vanteco, avareco, kaj fiero. Aŭ plej verŝajne pro la avideco de la riĉeguloj

Ĉu tiam tiu ununura homo, riĉulo – aŭ riĉulino – estos feliĉa. Mi treege dubas tion. Tiam ankaŭ li – aŭ ŝi – devos provi labori. Tio ne plaĉos al li aŭ ŝi. Li – aŭ ŝi – devos mem aranĝi sian liton. Li – aŭ ŝi – devos mem purigi sian domon. Li – aŭ ŝi – devos mem kuiri sian manĝaĵon. Li – aŭ ŝi – devos mem veturigi sian aŭtomobilon. Neniu helpas lin aŭ ŝin. Tre baldaŭ poste ankaŭ li – aŭ ŝi – mortos. Kaj neniu enterigos lin aŭ ŝin. Tio estos tio kion li aŭ ŝi ricevos pro sia fifieraĉo!

Pri la “ri”

DAVID ROCKELL (AŬKLANDO)

Kiam ajn ni ekvidas alian personon, ni tuj rimarkas ĉu tiu estas viro aŭ virino. Kiam ajn ni aŭdas ke bebo naskiĝis, ni tuj demandas ĉu tiu estas knabo aŭ knabino.

La sekso de la persono, kun kiu ni parolas, aŭ pri kiu ni parolas, ja gravas al ni. Tio donas al ni indikon pri la ebla konduto de la alia persono, kaj ĝi ankaŭ sugestas al ni kiel ni devus interrilati kun tiu.

Resume, estas bone kiam oni parolas aŭ skribas pri “ŝi” aŭ “li”. Tiamaniere ni povas kompreni la konduton de la priparolato pli bone.

Tio ne estas seksismo. Tio ne estas diskriminacio inter la seksoj, sed nur fakto kiu povas helpi al ni komprenigi la rakonton.

Tion dirinte, mi notas la averton de Bertilo Wennergren en PMEG (paĝo 104): “Pli-malpli ĉiu konsonato +i estas jam proponita kiel anstataŭaĵo de neŭtra ‘li’ – eĉ sola ‘i’ estas proponita – sen praktikaj rezultoj. ... Tiuj, kiuj pripensas reformojn, estu do avertitaj, ke apenaŭ eblas ion novan proponi.”

Mi notas ankaŭ ke, krom la polineziaj, ĉiu lingvo, kiun mi konas eĉ supraĵe, distingas inter “li” kaj “ŝi”.

Do, responde al la demando de la redaktoro en ESK 121, mi diras, ke “ri” estas nenecesa neologismo kaj evitinda aldono al la lingvo internacia.





La vivstilo de plantoj

DONALD ROGERS (LOWER HUTT)

La plej praaj vivestaĵoj estis unuĉelaj. Antaŭ 500 milionoj da jaroj ili evoluis en du tipojn. El unu venis la bestoj, el la alia venis la plantoj. La plantoj adoptis fiksitan vivstilon, bestoj evoluis laŭ nomada vivstilo. Tial, la plantoj devas akiri el la tero, la aero kaj la suno ĉion bezonatan por vivi, dum bestoj nutras sin per aliaj bestoj aŭ per plantoj.

Estante predataj de bestoj, plantoj evoluigis pasivan rezistadon al atako. Ili konstruiĝas laŭ modula sistemo, en kiu ĉiu parto estas grava sed ne tute nemalhavebla. Dum bestoj havas organojn por fari gravajn funkciojn, ekzemple cerbo, koro, pulmoj, stomako, plantoj evitas koncentri siajn funkciojn tiel. Do plantoj spiras sen pulmoj, nutras sin sen buŝo aŭ stomako, staras sen skeleton, kaj decidas sen cerbo.

Pro la konsisto, granda parto de planto estas forigebla sen risko al ĝia travivado. Iuj plantoj povas ankoraŭ vivi post la formanĝo de 90% de ĝia maso. Ili rekreskas el la restanta stumpo. Planto konsistas el ripetantaj moduloj: branĉoj, tigoj, folioj, radikoj, ktp. Ĝardenistoj ofte dividas plantojn por kreskigi pliajn plantojn. Eĉ malgranda peco, stikaĵo, kreskos en novan planton. Planto ne agas kiel individuo, sed oni povas konsideri planton kolonio. Planto

pli similas al kolonio de abeloj aŭ formikoj ol unuopa besto.

La Interreto havas similajn trajtojn: se parto de la reto paneas, la resto povas daŭre funkcii kaj sendi mesaĝojn alivoje por eviti la nefunkciantan parton.

Planta perceptado

Uzante diversajn sensajn receptilojn, plantoj sentas lumon, graviton, temperaturon, humidecon, kemiajn substancojn, reorientiĝon, magnetajn kampojn, infektojn, histodamaĝon, kaj mekanikan premon. Kvankam centra nervosistemo mankas al ili, plantoj interpretas kaj respondas al tiuj stimuloj per diversaj hormonaj kaj interĉelaj komunikadoj kiuj kaŭzas moviĝon kaj morfologiajn ŝanĝojn.

Sciencistoj ankoraŭ diskutas ĉu plantoj povas percepti sonon. Multaj faris eksperimentojn ludante muzikon al plantoj kaj mezurante ĉu la kreskado diferencas al tiu de plantoj sen muziko. La rezultoj estas kontraŭaj.

Sono estas vibroj kiuj moviĝas tra areo kaj tra aliaj medioj, sed ne tra vakuo. La tero kondukas sonon tiel efike ke la plantoj (kaj serpentoj, tervermoj, talpoj, k.a.) povas senti sonon per ĉiuj siaj ĉeloj per siaj mekanosentaj kaneloj. Lastatempe kvinjara eksperimento ŝajne montris

ke muziko kaŭzas la esprimadon de plantaj genoj. Oni trovis ke uvoj kreskis pli bone kaj forpelis insektojn. Kiel tio okazas, tio estas mistero. La radikoj perceptas sonon/vibrojn, precipe inter 100 kaj 500 Hz (basaj sonoj) sub la tero. Kaj tio stimulas la saman ĝermadon, kaj la kreskadon de radikoj kaj tigoj. Tamen pli altaj frekvencoj inhibas tiajn funkciojn.

Esplorado en 2012 montris ke radikoj povas produkti sonojn (klaketojn), sed kiel tio okazas, tio ne estas konata. Eble tio estas antaŭe nekonata metodo de komunikado tipa al svarmoj.

Planta inteligento

Biologiaj retoj evoluis en milionoj da jaroj kaj solvas optimumigajn problemojn sen centra regado. La ŝlima ŝimo *Physarum polycephalum* formas retaĵojn kun komparebla efikeco, panee tolero, kaj kosto al tiuj de homfaritaj infrastrukturaj retoj, ekzemple la fervoja sistemo en Tokio.

Sciencistoj lastatempe esploras plantan konduton rilate al ilia nivelo de inteligento, difininte inteligento esti la kapablo solvi problemojn. Oni longe akceptis ke eĉ simplaj bestoj, ekzemple amebo, havas etan inteligenton, do estas logike konsideri ankaŭ plantojn. Estaĵoj bezonas lerton por serĉi nutraĵon konkurse kun aliaj estaĵoj. Biologoj diras ke inteligento ampleksas la trajtojn

de perceptado, informotraktado, lernado, memorado, elektado, optimumado de laboro, kaj antaŭvidado de konsekvencoj. Plantaj specioj manifestas tiajn kapablojn adaptiĝante al la vivmedio anstataŭ moviĝante. Oni tial povas rigardi plantojn prototipaj inteligentaj organismoj.

Charles Darwin malkovris ke plantoj regas sin ĉefe per la pintoj de la radiketoj, la t.n. radikcerbo. Plantoj estas minimume konsciaj. Nun oni studas elektrajn signalojn en la radikoj, kiuj eble estas similaj al tiuj en bestoj. Tamen plantoj ankaŭ utiligas kemiaĵojn por signali al aliaj partoj de la sama planto aŭ al aliaj plantoj. Iuj plantoj ankaŭ komunikas kun bestoj aŭ kun fungoj en simbiozaj rilatoj. Ekzemple iuj plantspecioj kunlaborigas bestojn por disvastigi la polenon aŭ la semojn.

Multo restas esplorinda.

Bibliografio

Verde brillante: Sensibilità e intelligenza del monde vegetale, Stefano Mancuso kaj Alessandra Viola, 2013, Giunti Editore S.p.A. Firenzo-Milano kaj ĝia angla trakuko *Brilliant Green: The surprising history and science of plant intelligence*, tradukis Joan Benham, 2015, Island Press.

What a Plant Knows, Daniel Chamovitz. 2012, Scribe.

https://eo.wikipedia.org/wiki/Planta_percepto



DEMANDOJ



Trevor STEELE
Adelajdo, Sudaŭstralio

Alan BISHOP
Melburno, Viktorio

Kion vi ŝatas pri via loĝloko?

Ĝi ne havas karakteron de grandega urbo, do la etoso estas malpli streĉa ol tiu de ekz. Melburno! Najbaras belaj pejzaĝoj. La E-komunumo estas amika.

Kia estas la mondo, kiun vi imagas?

Mondo, en kiu ne estas grandaj diferencoj de (mal)riĉeco; en kiu ĉiuj konscias pri ekologiaj problemoj kaj agas laŭe.

Kian laboron vi deziris havi kiam vi estis infano?

Mi estis revema knabo kaj ne imagis specifan karieron - sed mi volis vojaĝi.

En kiu lando vi ŝatus loĝi dum unu jaro se vi havus la ŝancon?

Turkio kaj aliaj "luliloj" de frua kristanismo (cele al verkado).

Kiel junulo, kiun vi admiris?

Herooj, kiuj oponis krimajn registarojn, ekz. tiun de Hitler kaj Stalin.

Kion vi ŝatas pri via loĝloko?

Facila transporto - 2 tramoj, biciklaj vojoj, promenoj, kvieta etoso. Moderna apartamento. Bona aspekto, proksimaj butikoj.

Kian laboron vi deziris havi kiam vi estis infano?

Ludisto!

En kiu lando vi ŝatus loĝi dum unu jaro se vi havus la ŝancon?

Kanado

Kio plej timigas vin en la nuna mondo?

La industrio pri armiloj. La rolo de la amaskomunikistoj. Sekureco. La ŝanĝiĝo de la klimato.

Kiel junulo, kiun vi admiris?

Beethoven, Stephen Hawking, Nelson Mandela.

Gramatikaj aspektoj de Esperanto

MARCEL LEEREVELD (MELBURN)

Aglutinaĵoj

Por montri kiom profunde, kaj por multaj kiom neinterese, oni povas penetri en la esencon de lingvoj, mi donas al vi studeton pri unu el la aglutinaĵoj en Esperanto, kiu ne ekzistas en la ĝermanaj, ja aglutinaj, lingvoj, escepte iomete en la angla, en kiu nuntempe uzatas pluraj specoj de aglutinaĵoj miksitaj kaj senordaj.

Temas pri la Esperanta fenomeno de adjektiva kunluiĝo de ĉefelementa prepozicio kun sia substantiva objekto, ekz. “enlanda” kaj “eksterlanda”, kaj eĉ kun ekstra adjektivo: “postduonhora/e”. Notu ke ne temas pri la duonaglutina adjektivigo (aŭ adverbigo) de substantivo (aŭ verbo) kun sia adjektivo (aŭ adverbo) kiel en “grandanima” kaj “rapidkure” kiuj, por esti plene aglutinaj, devus esti la ankoraŭ apenaŭ uzataj “animgranda” kaj “kurrapide”. Kontraŭe, la kunmetoj kun prepozicio (ekz. “enlanda”) havas du nuancojn de signifo, kiujn nuancojn decidas la ĉirkaŭantaj esprimoj. La du nuancoj kaŭzatas de la du originoj de ĉi tiaj vortkunmetoj.

Por klarigi la du nuancojn, de tiuj formitaj el prepozicio kun origina substantivo, mi devas unue menciigi kelkajn karakterizaĵojn de vortkunmetado. Unue, la fakton ke al ĉiu aglutina kunmetaĵo aldoniĝas la signifo “speciala” (kvankam neesprimata). Se oni ne povas aldoni tiun specialecon al la nova signifo, oni ne povas krei aŭ uzi tian kunmetaĵon. Due, ĉiu aglutina kunmeto havas ĉefelementon kaj flankelementon, kaj krome la signifon, kelkfoje menciitan, de la interrilato inter la du, kaj nome plejofte en la, uzata aŭ neuzata, formo de prepozicio. Trie, ekzistas ankaŭ en Esperanto naturaj kaŭzoj kiuj devigas la lingvon havi esceptojn. Ekzemplo de tio estas ke oni ne facile povas uzi vortkunmetojn kun personaj pronomoj ĉar pro mallongeco oni ne povus rekonigi la partojn de kunmetaĵo (ekz. sidona kaj ilipatro kaj patrili). Alia ekzemplo, montriĝanta en mia ĉi suba priskribado, estas ke se ĉe kunmetaĵo la ĉefelemento estas prepozicio, oni tamen ne povas havi ĝin ĉe la fino de la kunmetaĵo (ĝia normale deviga loko) ĉar ĉe la plejmulto de tiaj kunmetaĵoj oni

ne povus rekoni la partojn, do nek la signifojn. Kvare, notindas ke Esperanto, kaj hazarde la angla, havas kunmetaĵojn kiuj estas nur duone aglutinaĵoj, kiel la anglaj “(an) on the spot (answer)” kaj “(a) spot-on (answer)”.

Revenante al la temo, ni imagu ke ni parolas pri la multaj domoj kiujn malsamaj popoloj fosis en la sabloŝtonajn montojn en centra Turkujo. Tiuj popoloj loĝis enmonte, kaj la nunaj turistoj svarmas enmonte, sed en du malsamaj nuancoj. Ekzistas tri specoj de la kunmetaĵo de “en” kun “mont”, do de “enmont”, unu el ili el pli longa kunmeto. Iliaj nuancaj signifodiferencoj dependas de kiu parto estas la ĉefelemento de la kunmetaĵo, kaj kion oni emfazas en ĝi. En Turkujo ni do parolas pri du specoj de homoj, unu loĝanta kaj la alia svarmanta en la montoj. A. En la unua kazo temas pri la specialeco de la loĝantoj, nome per la termino “enmontloĝantoj”. Ĉar oni ne sentas la bezonon havi specialan vorton por tio, oni ne uzas tiun vorton, kaj oni diras “loĝantoj en la montoj”, aŭ “enmontaj loĝantoj” (same kiel oni ŝanĝas “alhejmveno” al “alhejma veno” kaj “endomrestado” al “endoma restado”). Kaj la emfazo estas sur “enmontaj”. B. En la dua kazo temas pri la speciala speco

“en” de hazarda loko, do kun la emfazo sur “en”, ĉe “mont-enaj turistoj”, kiun vorton oni ŝanĝas al “enmontaj”, kvankam “en” estas la ĉefelemento de ĉi tiu plenaglutinaĵo (t.e. ĝi formiĝis el nur “en” kaj “mont”). C. Dum la turistoj estas “enmontaj” (= B) kaj la loĝantoj estis “en la montoj” (= A), oni ofte mallongigas “en la montoj” al la pli bonstila “enmontaj”, kiu estas, ĉar mallongigo, duonaglutinaĵo. Sed la signifonuanco restas, “ne enarb, sed enmont”, do kun specialeco de “enmont” kaj kun emfazo sur “montaj”, dum ĉe la kazo B la emfazo estas sur “en”, kiu elemento difinas la parton “loĝantoj”.

Jen alia ekzemplo de la du nuancoj ĉe tiaj vortkunmetaĵoj: “eksterdoma”; A. Temas pri speciala formo de kuirejo, ekster la domo, kun la emfazo sur “eksterdoma”, kaj malsama al la kutimaj kuirejoj en la domo. Ĝi do estas eksterdomkuirejo. Sed oni ne uzas tiun vorton, pro gusto. B. Temas pri la speciala speco de hazarda loko, do la emfazita “ekster” en “domekstera” ŝanĝita al (hazarde) “eksterdoma” kuirejo, kie “domekstera” kaj “eksterdoma” estas ambaŭ plenaglutinaĵoj kaj emfazas la eksterecon. Do “Kie estas la kuirejo eble samforma?” Respondo: “Ne en sed ekster la domo”. C. Dum unu kuirejo estas

hazarde “eksterdoma”, kiel sub B, alia kuirejo povas esti “eksterdomeca”, nome de la eksterdoma speciala speco, la specialeco “eksterdom” de sub A. Ĝi sekve estas “eksterdomkuirejo”, sed oni uzas la mallongan formon duonaglutinan “eksterdoma” ne el “domekster” sed el “eksterdomkuirejo”, kaj kun la emfazo sur “doma”.

Tria ekzemplo: A. En unu regiono la flagoj sur la montoj estas alispecaj, aliformaj, ol la flagoj sur la valaj konstruaĵoj, kaj do la flagoj estas la specialeco ĉi tie. La emfazo devas esti sur “surmontaj” en la esprimo “surmontflagoj”, kiu lasta esprimo ne uziĝas. Oni diras anstataŭe “specialaj flagoj sur la montoj”; sed vidu C por alia anstataŭo. B. En alia regiono ĉiuj flagoj samas, kaj kiam oni mencias la flagojn sur la montoj, oni emfazas “sur” per “montsuraj = surmontaj flagoj”. La flagoj estas “sur”, ne “sub” aŭ “apud”, kaj “mont” difinas la specon de “sur”, nome “monta sureco”. C. Kiam, kiel sub A, la speciala speco (do ilia specialeco) de flagoj troviĝantaj sur la montoj estas “surmontflagoj”, ili estas mallongigitaj al “surmontaj flagoj”, do ili estas en duonigita esprimo tial duonaglutina. Emfazo sur “montaj”.

Kvara ekzemplo: “Parolado post la manĝado: A. Speciala parolado kiun

oni faras post manĝoj, do (verŝajne neuzata) “postmanĝparolado” el “manĝado post la manĝo”. La emfazo estas sur “postmanĝa”. B. La specialeco estas “post”, ĉar ĝi ne estas speciala speco de parolado, do ĝi estas “postmanĝa parolado”, emfazanta la tempon “post” per la plenaglutinaĵo “postmanĝa” el la logika “manĝposta”. C. Ŝanĝo de “postmanĝparolado” al “postmanĝa” parolado, emfazanta ke la parolado okazas iam apud la manĝo kaj ke tiu “iam” reprezentatas per “post”. Do, ne “(post)balotada” sed emfaze “(post)manĝa”.

Fina ekzemplo: A. Mia vojaĝo estas speciala speco de vojaĝo, nome “transmarvojaĝo”, vorto eble uzata. La emfazo estas sur “transmara”. B. Aliflanke mia vojaĝo ne estas speciala speco de vojaĝado; ĝi estas hazarde transa, martransa, ŝanĝita al “transmara” kiu emfazas la transecon “trans”. Do, ne apudmara aŭ maltransmara, sed “transmara”. C. Ĉi tie la emfazo estas sur “mara” en la mallongigita “transmara” vojaĝo el “transmarvojaĝo”. Do ne “transmonta, sed transmara vojaĝo. La specialeco estas “transmar”.

Nu, leginte la ĉisupron, preskaŭ ĉiuj diros: “Uf, mi ĝojas ke mi ne bezonas scii ĉion ĉi supran.” Kaj kelkiuj eble diros: “Hura, mi ĝojas ke mi volas scii la ĉisupron.” Kaj

nur unu diros: “Mi konstatas ke vi jam suferas je demenco”. Mi pretas por la defio.

Geografiaj nomoj

Geografiaj nomoj estas propraj nomoj same kiel la nomoj de personoj (Johano), tagoj, monatoj ktp; tial ili ĉiam havas la ĉefliteron kaj ne ĉehavas la artikolon (la), escepte en kelkaj specifaj kazoj naturaj.

La nomoj de la homoj kiuj loĝas en lando estas komunaj nomoj, kaj tial ne havas ĉefliteron kaj normale jes havas la artikolon “la”, ekzemple la kanadanoj apartenas al Kanado kaj la ĉeĥoj al Ĉeĥujo. Anstataŭ la artikolo “la”, la landanoj povas ĉehavi alian indikan vorton, ekz. ĉiu kanadano, mia francino, kaj ili povas en la pluralo esti sen indikvorto nek artikolo: kanadanoj loĝas en Kanado kaj rusoj loĝas en Rusujo.

Kiam lando ĉehavas adjektivon, ĝi povas ĉehavi ankaŭ la artikolon: la kreskanta Eŭropunio. La adjektivoj kaj la adverboj faritaj el landnomoj ne havas la ĉefliteron en Esperanto: la suomia (= finlanda) ŝtato, ili dancas ruse.

La nomoj por la lingvoj estas ankaŭ komunaj substantivoj, do sen ĉeflitero kaj kun la artikolo: la ĝermanaj lingvoj, la franca (lingvo), escepte de kelkaj propraj nomoj kun ĉeflitero kaj sen la artikolo, inter kiuj Latino, Esperanto, kaj Sanskrito.

La geografiaj nomoj (ja propraj nomoj) ege malofte ekzistas en la pluralo: Germanujo dividatis (= got divided) en du Germanujojn: Okcidentgermanujo kaj Orientgermanujo.

Ĉe riveroj kaj montoj, kiuj ja devas ne ĉehavi la artikolon “la”: mi veturis sur Misisipo kaj tra Rokmontaro, oni ofte erare ĉeuzas la artikolon, traktante tiajn esprimojn kiel mallongigaĵojn de “la rivero Misisipo” kaj “la monto Mont-Blanc”. Ĉi tiu uzo de la artikolo estas evitinda.

Zamenhof uzis du manierojn por krei landnomojn kaj popolnomojn. En la unua la landnomo estas radiko kaj la enloĝanto ricevas la sufikson -ano: Nederlando > nederlandano, kaj en la alia maniero la popolano estas radiko kaj la lando ricevas la finaĵon -ujo: franco > Francujo. La plejmulto el la eŭropaj landoj sekvas la duan manieron: portugalo > Portugalujo, kaj la plej multaj alikontinentaj landoj sekvas la unuan manieron: Usono > usonano. Oni devas por ĉiu lando lerni en kiu el la du klasoj ĝi apartenas. Kelkfoje la radiko de la lando finiĝas per la literoj -io, kiu -i- estas parto de la radiko kaj la popolano do ricevas la finaĵon -ano: Indonezio > indoneziano. Pluraj Esperantistoj ankoraŭ uzas la sufikson -io- por anstataŭi la

sufikson -ujo-. Tiu sufikso -i- estas malamika al Esperanto, ĉar ĝi mallogikas Esperanton baziĝante sur pluraj esceptoj gramatikaj. Ĝi do estas tre evitinda.

Teorie ĉiu geografia nomo, ja reprezentanta nur unu aferon, nur unu nocion, devas konsisti el nur unu radiko: Sudaŭstralio, Novsudkimrio, sed multaj Esperantistoj traktas tiajn nomojn malĝuste kiel kunmetaĵojn: Novzelando el nova kaj Zelando, sed praktike tio ne gravas ĉar oni normale ne bezonas spliti ilin.

Por traduki en Esperanton geografian nomon, oni kutime adaptas la literumadon kaj la prononcadon al Esperanto, en romaj literoj (ekzemple Velingtono por Wellington). Sed kelkaj homoj malsaĝe tradukas la nomon:

Novsudkimrujo. Bonŝance nur malmultaj tiaj strangaj nomoj kreas en la mondo.

La plej multaj geografiaj nomoj estas ankoraŭ neoficialaj, do ĉiu rajtas proponi kaj uzi novan aŭ alian vorton. Tamen estas konsilinde lasi la multegajn internacie ne konatajn geografiajn nomojn en ilia ne-Esperanta nacilingva formo en Esperanto kaj nur en romaj literoj.

Aldona rimarko de la redaktisto:
Dankon al Marcel pro liaj tre interesaj kaj pensigaj artikoloj. La temo de landnomoj estas ofte diskutata afero dum multaj jardekoj. La Akademio de Esperanto ne rekomendas la uzon de '-io' por formi landnomojn sed lasas al la ĝenerala uzado libere decidi kiu estas la pli oportuna formo.

La bushaltejo

TRISTAN MCLEAY (MELBURNO)

Mia partnero kaj mi antaŭnelonge aĉetis domon kaj translokiĝis en ĝin. Ĉar ni ne veturas aŭtomobile, ni bezonas domon proksiman al publika transporto, kaj sukcesis ni je tio: ni loĝas nur piediron da kvin minutoj for de la stacidomo, sed fakte estas bushaltejo rekte antaŭ nia pordo. La bushaltejo estas nekomprenebla.

Alvenas ĉiutage sesfoje aŭtobusoj.

Kiam ajn mi serĉas en la reto la horaron, mi neniam trovas. Mi ne zorgas; mi scias la horaron ĉar la buso neniam alvenis malfrue. Sed rete la haltejo ne ekzistas kaj la numeron oni ne uzas ekde antaŭ mia naskiĝo.

Alvenas la aŭtobuso el nenie, kaj nenien ĝi iras. Iun fojon, kiam mi iris hejme de la stacidomo, mi vidis en la malproksimo la buson.

Inter tie, kie la buso estis, kaj mi, ne ekzistas aliaj stratoj laŭ kiuj la buso povas iri. Sed mi ternis kaj la buso poste ne estis videbla. Ĝi ne povis fali de la rando de la mondo sed ĝi ankaŭ ne povis iri preter mi dum tiu momenteto. Mi ne povas kompreni tion.

Mia partnero trafis la buson iun tagon, kaj revenis post tri minutoj, kunportante lakton.

“Kie vi akiris la lakton?”

“Ĉe la butikio ...?” Mia partnero ne komprenas kial mi demandis.

“Tre rapide!” Plejofte daŭras dudek minutojn iri al la superbazaro, âceti ion, kaj reveni. Ne eblas eniri la superbazon, preni lakton, kaj pagi dum nur tri minutoj.

“Ĉu? Mi trafis la buson kaj revenis piede.”

Post tiam, mi vidas plurtage homon aŭ du kiuj surhavas novajn vestaĵojn de malnovaj manieroj. Mi volontulas, helpante disdoni vespermanĝon al senheimuloj. Mi ofte revidas tiujn vagantojn inter la senheimuloj. Sed neniam la senheimuloj estas vagantaj: ĉiam mi vidis ilin antaŭe vagantaj sur la strato ekster mia domo, kaj poste inter la senheimuloj. Oni diras ke ili havas alchejmermalsanon.

Pasintsemajne mi interparolis kun

vaganto kiu ne estas pli aĝa ol mi.

“Mi perdas la vojon, mi tre konfuziĝas. Ĉu vi scias kie Rafaellos estas?” Rafaellos estis butikio, antaŭ ol superbazaroj ekzistis. Tia kie oni petas al la butikisto lakton kaj panon kaj sapon, kaj la butikisto donas ilin al oni. Sed mi ne sciis tion tiam.

“Kie vi loĝas?” time mi demandis. Ankaŭ prave, ĉar li montris fingro al mia domo. Nesurprize ni interparolis ree ĵaŭdon. Senheimiĝontaj estas la vagantoj ĉiam.


Eble temas nur pri ia scivolemo. Homoj certe ekzistas kun alchejmermalsano, eĉ tre junaj. La tempon eble mi konfuzis.

Sed hieraŭ tri junuloj malaperis. Mi estas la lasta kiu vidis ilin: ili atendis ĉe la bushaltejo. Mi ne scias kie ili estas, sed ili ja malaperis, tute malaperis, samkiel la buso. El kie ajn la vagantoj venas, tien la junuloj iris.

Bonvolu kredi min!

Ajna krucvortenigmo

PETER WILLIAMSON (MELBURNO)



HORIZONTALA

- 1 - La malo de fino
4 - Sistema instruado - aparte ĉe lernejo
8 - Kiu studas
11 - La ekstera limo de objekto, areo, aŭ surfaco
12 - Kiom da kruroj havas polpo?
13 - Homo kiu loĝas apude

- 14 - Gasa tavolo ĉirkaŭ la tero
15 - Rilato per geedziĝo (prefikso)
17 - Iri al lito
19 - Subteni per brakoj aŭ manoj
21 - La glacio degelis ... la varmeco
22 - Surfantoj ŝatas bonajn ...
25 - La supro de la domo
28 - La komenco de januaro

29 - Preni spacon aŭ tempon
 31 - Aserto ke vi ion faras
 33 - La partoj de la vizaĝo supre de la brovoj (pl.)
 36 - En antaŭdeterminita maniero
 37 - Difinita spaco
 38 - La plej ŝatata legomo de Popeye
 40 - La nemeso de Steve Irwin
 41 - Tiaj estas ideoj el larĝa gamo de influoj
 43 - Malpura energiofonto
 45 - Nuna, nuntempa
 47 - Grasa
 52 - Kiel deklarite aŭ raportita de; sekvante la direkton de
 54 - Grimpada helpo
 55 - Transdono
 56 - Vera, ne kopio
 57 - La komenco de tempo
 58 - Fervoro, pasio
 60 - Afero vidata
 61 - Kiam oni ne povas aŭdi, oni estas ...
 62 - La komenco de nenio
 64 - Formatita formo por kopii; modelo
 66 - Surfaca segmento por kovri tegmenton aŭ plankon
 68 - La komenco de horo
 69 - Ne speciala
 71 - Triangulo, kvadrato aŭ cirklo ekzemple
 72 - Peco de peza artilerio
 73 - La patro de via patro aŭ patrino
 74 - Du aŭ pli en grupo aŭ teamo
 75 - Negative ŝarĝita partiklo
 78 - Biologia aŭ botanika vivaformo
 79 - Organo de vido
 80 - Unu el la helpanoj de Patro Kristnasko

VERTIKALE

1 - Lumoj faritaj de vakso
 2 - Subita lumo
 3 - Rara metalo
 4 - Viroj post geedziĝo
 5 - La kvina litero
 6 - La komenco de kanto
 7 - Evento
 8 - La junaj soldatoj de Baden Powell

9 - Kien pluvakvo iras post la tegmento
 10 - Kaŝi la lumon
 16 - En surpriza maniero
 18 - Se ĝi retenas vian atenton, la rakonto estas ...
 20 - Portempe preni
 21 - Laŭ proporcio
 23 - Uzita por mordi aŭ maĉi
 24 - Nova informaĵo, precipe pri freŝaj okazaĵoj
 26 - Ago inspira
 27 - Kvanto da valoraj objektoj
 30 - Kiam vi salutas iun vi diras ... (ne saluton)
 32 - La komenco de spaco
 34 - Unu el speco
 35 - Kiam vi havas tiklon vi volas grati, ĝi estas ...
 36 - Lau ĉies plaĉo
 39 - Senpenelokvente; li parolis Esperanton ...
 42 - Observema, koncii pri
 44 - Legomo por kimĉio aŭ saŭrkraŭto
 45 - Persono kiu skribas libron
 46 - Persona pronomo
 48 - Felo sur ŝafo
 49 - En la direkto de
 50 - Persono kiu volas ĉion
 51 - Inter la kapo kaj la ŝultroj
 53 - Unu el la sezonoj
 54 - Korporacia grupo de direktoroj
 58 - Ĉiuj ricevis donacon ... la hundo
 59 - Filozofo kiu kaŝas siajn sentojn
 60 - Alia vorto por trajno
 63 - Vi kaj mi
 64 - Beba lana besto
 65 - Manfred von Richtofen estis la ruĝa ...
 66 - Vestaĵo
 67 - Sovaĝa vetero, fortaj ventoj kun pluvo
 68 - La scienco de la materialaj elementoj
 69 - Tian lokon ni preferas en varmego
 70 - Morti en akvo
 75 - Li venis ... nenie
 76 - Malo de jes
 77 - Pli ... (kompare)


Recenzo: Lingo: A language spotter's guide to Europe de Gaston Dorren

DAVID RYAN (VELINGTONO)

Mi hazarde trovis ĉi tiun libron en iBooks (NZ\$9.99) kaj ege rekomendas ĝin por ĉiuj kiuj interesiĝas pri lingvoj (en ĉi tiu kazo, lingvoj parolataj en Eŭropo). La verkisto skribas en ĉiu ĉapitro pri la gramatiko, origino, historio, kaj nuna stato de diversaj eŭropaj lingvoj, ekde la plej konataj (franca, angla, hispana ktp) ĝis lingvoj kaj dialektoj de pli malgrandaj nacioj kaj regionoj (ekzemple hungara, kimra, romanĉa ktp).

Mi trovis la libron tre interesa kaj facile legebla. Ekde knabo mi interesiĝis pri lingvoj kaj mi multon legis pri lingvaj aferoj. Tamen, en ĉi tiu libro mi lernis multajn novajn faktojn, ekzemple pri:

- morto de lingvoj (ekzemple, la lasta parolinto de la dalmata lingvo mortis en junio 1898)
- refortiĝo aŭ renaskiĝo de mortantaj lingvoj (kimra, irlanda, bretona, manksa)
- lingvoj pri kiuj mi antaŭe sciis nenion (gagaŭza kiun oni parolas en aŭtonoma regiono de



Moldavio, oseta kiun oni parolas en Nord-Osetio, Sud-Osetio, Rusio, kaj Kartvelio)

- ŝanĝoj en la uzo de lingvoj, ekzemple la plifortiĝo de la kataluna lingvo aŭ, male, la jida lingvo kiu antaŭe estis vaste parolata de multaj eŭropaj judoj sed nun pli malofte uzatas, precipe post kiam oni elektis

la hebrean kiel oficialan lingvon de Israelo.

En ĉapitro pri Esperanto, la verkisto kritikas nian lingvon. Li diras ke Zamenhof ne kreis la plej facilan lingvon. Ekzemple, kial nia lingvo uzas akuzativon (plej multaj aliaj lingvoj jam perdis la akuzativon antaŭ multa tempo)? Kial devi uzi ‘parolanto’, ‘parolinto’ aŭ ‘parolonto’ por ‘speaker’ – kial ne unu vorto?

Interese, en la lasta ĉapitro kiu temas pri la angla lingvo, li ne tro fanfaronas pri la graveco de la angla. Fakte, li kredas ke eble la ĉina iĝos la nova internacia lingvo (verŝajne la ĉina estas pli facila ol la angla por multaj afrikanoj kaj azianoj) kaj li bonvenigas la fakton ke eble en baldaŭa estonteco niaj geinfanoj aŭ genepoj lernos ĉinan en la lernejo. (En Nov-Zelando – kaj mi imagas ke ankaŭ en Aŭstralio – tio jam okazas. Ŝajnas ke eŭropanoj ankoraŭ ne rekonas la estontan gravecon de la ĉina lingvo.)

Je la fino de ĉiu ĉapitro, aperas ekzemploj de vortoj kiujn la angla prenis el ĉiu lingvo. Do, jen eta ekzameno. Divenu el kiu lingvo venas la sekvaj vortoj (respondoj aperos en paĝo 30 en ĉi tiu numero de ESK):

1. Avalanche
2. Noodle
3. Eiderdown
4. Ski
5. Moped
6. Cravat
7. Robot
8. Plaid
9. Steppe
10. Guitar
11. Butter
12. Fetish
13. Manage
14. Menhir
15. Smuggler
16. Corgi
17. Trousers
18. Sauna
19. Biro
20. Air

Populara pola popolfabelo malnova verkita de mi mem

BOB FELBY (ADELAJDO)

Iam antaŭ du jarmiloj vivis en Polujo matura viro, malpura, kun nerazita vizaĝo kaj malbonaj, brunaj dentoj. Tiam ankoraŭ ne estis grandegaj urboj en kiuj deĵoris dentkuracistoj. Li do loĝis eble en, aŭ eble proksime al, grandega arbarego, en kiu loĝis ankaŭ multaj cervoj, kapreoloj kapriolantaj, nigraj aproj, sed verŝajne neniuj boacoj kaj polusaj ursoj, sed verŝajne kolubroj kaj kompreneble la eĉ tre popularaj vipuroj!

Tiu viro, mi ne scias lian nomon, ĉar mi ne majstras la verŝajne eĉ tre belegan lingvon polan, loĝis en ligna kabano kiun li mem konstruis por si. Mi ne scias de kie li akiris la laborilojn per kiuj li konstruis ĝin. Eble li aĉetis ilin en iu proksima vilaĝo, sed mi ankaŭ ne scias kiom ili kostis nek de kie li havis la monon. Do, bonvolu ne demandi min pri tiaj bagateletoj kaj sensencaĵetoj! Se vi tamen min demandos, vi riskos ke mi konfuziĝos, kaj plej verŝajne ne sukcesos fini tiun ĉi mian majstran verkaĵon!

Lia domo estis, laŭ niaj modernaj opinioj, iomete primitiva. Mankis en ĝi elektra lumo, gaso, kaj akvo. En la malantaŭa ĝardeno, ĉar li

havis ĝardenon, eĉ du, unu antaŭ la kabano kaj alia malantaŭe, li estis konstruinta lignan ŝedon en kiu li havis sian brullignon. Do, ĉu mi forgesis rakonti ke li havis ankaŭ hejtejon? Sed ne en la ŝedo, sed en la kabano. Supozeble li dormis apud la hejtejo, sed kompreneble nur dum la vintro. Ĉar li ne havis necesojn (tiaj luksaĵoj ankoraŭ ne estis inventitaj) li faris siajn necesojn malantaŭ la ŝedo, kie neniuj – kvankam ja estis neniuj – povis vidi lin, escepte de belega strigo kiu sidis sur branĉo alte en arbo kaj eĉ tre belege ululadis, kvazaŭ ĝi estus lupo, se lupoj ululas. Mi supozas ke hundoj ululas, kvankam mia hundeto ne faras tion, li nur bojas – kaj ĝojas -, kaj tio estas sufiĉe laŭta por miaj surdaj kaj neaŭdipovaj oreloj!

Kaj jen komenciĝas la pli ekscita parto de la malnova populara pola popolfabelo, verkita de mi mem. Nun mi devas rapide pensi pri io kion vi povus kredi. Io kio kredeble okazis antaŭ tiom da jaroj, antaŭ du mil jaroj, preskaŭ precize, se mia brakhorloĝo ankoraŭ bone, eĉ bonege, funkcias! Do, bonvolu sidigu vin almenaŭ iomete pli komforte, ĉar neniuj scias ĉu vi

bezonos nervokuraciston pro la teruraĵoj, kiuj sekvos se mi nur povus pensi pri io tia!

Estis malfrua vespero, tion mi rajtas diri, ĉu ne? Mi ne scias kioma horo estis, ĉar la horloĝo ankoraŭ ne estis inventita. Kaj ni ĉiuj povas konsenti ke estis iomete, se ne tre, mallume en lia sidoĉambro ĉar, kiel jam dirite, ankoraŭ ne estis inventita la elektro. Sed la kandelo estis inventita. Fakte, mi ne scias ĉu ĝi vere estis, sed ni ja bezonas iom da lumo en ĉi tiu malluma, sed tamen ekscita malnova populara pola popolfabelo, kiun mi mem verkis, kvankam ĝi ankoraŭ ne estas finverkita ĉar mi ja ne scias kio nun okazos.

Sed, kvankam la kandelo estis inventita, necesas diri ke bedaŭrinde la alumeto ne estis, ĉar ĝis tiam neniuj inventis la alumetfabrikon. Se mi bone memoras, estis neniuj fabrikoj en la populara Polujo tiam. Necesis preni du pecojn de brulligno el la ŝedo tuj apud la grandega arbarego en kiu sidis, alte sur branĉo de altega arbo, bela strigo ululanta. Ĝuante la ululadon de la bela strigo, oni sidis kelkajn horojn frotante la du pecojn de brulligno unu kontraŭ la alia, ĝis ambaŭ pecoj iĝis, iom post iom, varmetaj, varmaj, kaj fine varmegaj. Kiam ili ne povis iĝi pli varmegaj, espereble aperis flameto, per kiu eblis bruligi la meĉon de la

kandelo. Espereble, la meĉo estis inventita; se ne, tio baldaŭ okazos! Tio estis la unua invento de la lumo per kiu oni povis lumigi la vojon de la ligna kabano ĝis malantaŭ la ŝedo vidata nur de la bela strigo alte sidanta sur branĉo de altega arbego, ĉu ne?

Por iom plilongigi tiun mian estontan majstroverkon, permesu al mi aldoni ke tiu nia ŝatata viro pola ne estis razita, eble ĉar la elektra razilo ankoraŭ ne estis inventita. Mi scias ke li havis tranĉilon, sed mi dubas ĉu li kuraĝis razi sin per ĝi, ĉar ĝi estis akra, eĉ tre! Kaj ĉar li loĝis tute sola en sia ligna kabano estis neniuj kiujn li devis imponi per glata vizaĝo, escepte de la strigo kompreneble, kiu sidis ululante sur branĉo de alta arbo malantaŭ la ŝedo en la malantaŭa ĝardeno de la barbhava polo. Mi supozas ke de tiu sia branĉo de la alta arbo en la grandega arbaro, ĝi ne povis ne rigardi kaj naŭziĝi pro la postlasaĵoj malantaŭ la ŝedo de la populara polo.

Nu, mi scias ke hodiaŭ, du mil jarojn post ĉi tiuj teruraj okazaĵoj, estas ĝentile frapi pordon, antaŭ ol eniri. Sed ĉu oni faris tion antaŭ du jarmiloj, eble jes, eble ne, kiu povas memori? Sed subite eniris du aliaj viroj. Mi ne scias ĉu ili estis policistoj aŭ policanoj, aŭ eble skoltoj. Ankaŭ ili havis nerazitajn vizaĝojn, verŝajne

pro la samaj kialoj kiel nia ŝatata heroo de tiu ĉi malnova populara pola popolfabelo, kiun mi nun verkas. Unu el ili portis kandelon flamantan ĉar estis necese havi almenaŭ iom da lumo. Do, ŝajnas ke la meĉo estis jam inventita. Ili iomete timigis nian polan amikon, verŝajne ĉar ili preskaŭ tuj ordonis al li akompani ilin al la ŝedo en la malantaŭa ĝardeno antaŭ la alta arbo en kiu, sur branĉo, sidis la ululanta strigo naŭzite rigardante la postlasaĵojn de la populara polo.

Bone, ĉu ne? Espereble nun la ekscitiĝo vere komenciĝos. Ili malfermis la pordon de la ŝedo. La strigo, sidanta sur branĉo de altega arbego en la arbarego, diris nenion. Nia amiko pola iĝis pala. La du aliaj barbuloj, ankaŭ ili havis brunajn, malbelajn dentojn, sed ne multajn, ordonis, almenaŭ mi supozas, ke ili ordonis, ĉar mi ne komprenas la polan, kaj precipe certe ne la polan parolatan antaŭ almenaŭ du jarmiloj, ke la pala polo elĵetu la brullignon kiu kovris la plankon de la ŝedo.

La pala polo elĵetis unu pecon da brulligno. La du aliaj polaj barbuloj ekfuriozis ĉar laŭ ili, la palulo ne suface rapide laboras. Ili kriegis ion al li, same kiel laborgvidantoj en fabrikoj faras hodiaŭ, ĉu ne? Mi ne scias kion ili furioze kriegis ĉar, kiel jam dirite, mi ja ne komprenas la polan lingvon, ĉu mi ne jam klarigis

tion al vi? Kaj certe ne tiun kiun oni parolis antaŭ tiom da jaroj. Sed ili ne helpis la palulon. Estas strange ke li estis pala, ĉar li ja neniam lavis sin. Iom post iom, sed tre malrapide, ĉiu peco da brulligno nun kuŝis ekstere de la ŝedo. Oni povis vidi la plankon de la ŝedo. La planko estis la nuda tero.

La palulo eĉ multe pli paliĝis de timo kaj iĝis, se tio eblis, eĉ multe pli pala. La du policistoj, aŭ policianoj, aŭ skoltoj ordonis al li ekfosi en la planko. Nu, mi petas vin pardoni min ĉar mi tute ne scias ĉu la ŝpato kaj ŝovelilo tiam estis jam inventitaj sed la timigita palulo komencis fosi en la tera planko.

Iom poste videbliĝis io kio certe ne devus esti tie en la tero. Io blanka kun grandaj truoj, kie iam estis polaj okuloj. Ankaŭ granda truo kie iam estis pola nazo, kaj ankaŭ granda truo kie iam estis pola buŝo. Mi ne mencias la truojn en kiuj iam estis polaj oreloj, ĉar tiuj truoj ne estas sufiĉe grandaj por veki teruron en la menso de la leganto de tiu ĉi malnova pola popolfabelo, aŭ ĉu? Videblis eĉ kelkaj brunaj dentoj. La dentoj ŝajnis rideti, eĉ ridegi, fakte rikani, eĉ rikanegi! Kaj la pala polo ĉesis la fosadon. La du aliaj poloj, ili ne estis palaj, refoje ion en la antikva lingvo pola kriaĉis kaj la pala polo fosis eĉ multe pli profunden. Jen aperis multe pli da malnovaj ostoj

kaj unu plia kranio kun rikaneganta buŝo. La du policistoj, aŭ policianoj, aŭ skoltoj, rapide, eĉ rapidege, konjektis ke temas pri mortigo de du ankoraŭ ne vivantoj, kaptis la palan polon polan je la brakoj, ĉar la mankateno ankoraŭ ne estis inventita, kaj forkondukis lin tra la ligna kabano kaj tra ĝi al mi ne scias kien. Eble al la policejo, se io tia estis inventita.

Sed post ioma pridemandado malkovriĝis ke nia populara pala pola amiko estis mortiginta geedzan paron ĉar tiu geedza paro estis amuzanta sin per ĉasado de senkulpaj kaj sendefendaj bestoj, nigraj aproj, cervoj kaj kapreoloj kapriolantaj en la grandega arbarego. Nia populara polo estis, kaj tio ni ĉiuj ja devus esti, kaj resti, bestamanto. Eble tial li elektis loĝi en aŭ apud la arbarego. Sed eĉ pli malbone por li estis ke tiu geedza paro estis la tiamaj gereĝoj de Polujo. Tiu bedaŭrinda fakto igis la mortigon, fare de la populara polo, krimo. Ke tiuj du polaj gereĝoj faris la saman krimon, tute ne helpis la popularan polon. Estis do decidite ke ankaŭ la populara polo, same kiel la senkulpaj bestoj, nigraj aproj, cervoj kaj kapreoloj kapriolantaj, estu mortigita. Devas ja esti ia justeco, ĉu ne?

Do, li estis kruele ĵetita en malluman kaj malpuran karceron. Ankaŭ tie ne estis elektra lumo, nek

gaso nek akvo. Eĉ ne kandelo. Tie li do sidis, pardonu, kelkajn horojn li pasigis kuŝante sur la planko. Tiel li pasigis proksimume du mil jarojn en granda mizero kaj malĝojo.

Sed subite okazis io espereble bona, sed verŝajne ne tiom bona, kiom povus esperi la bonkora kaj populara polo. Oni metis lin en aviadilon kaj flugigis lin al Aŭstralio. Tio estis io, ĉu ne? Aldoni ankoraŭ unu "krimulo" al la multaj aliaj jam alvenintaj tien. Precipe tiuj tro multaj en la parlamentejo. Kaj li tute ne devis pagi pro la flugo. Sed lia ĝojego bedaŭrinde ne daŭris longe. Oni flugigis lin, el ĉiuj lokoj, al Adelajdo kaj pendigis lin de la granda kaj alta lumturo en la havenkvartalo de tiu belega kaj vizitinda urbo.

Intertempe, post tre longa vivo sidante ululante alte en arbego en la granda arbarego, forlasis sian plumplenan korpon la bela strigo. Sed, kiel tre ofte okazas, ĝi reenkarniĝis kiel papago aŭstralia parolanta Esperanton! Mi aĉetis ĝin en bestvendejo en Adelajdo. La papago, t.e. la eksstrigo, kaj mi iĝis eĉ bonegaj amikoj. Mi tre amas tiun malgrandan amikon samtempe dankante lin ĉar vere li estas dankinda, ĉar estas li, kiu rakontis al mi tiun ĉi malnovan popularan polan popolfabelon!

Recenzo pri la libro *Tra la Lando de Kanguruoj* de Tibor Sekelj

MARCEL LEEREVELD (MELBURNO)

Ĉi tiu traduko Esperanten el la serb-kroata konsistas el dek-kvin rakontoj, tri pri Nov-Zelando kaj la resto pri Aŭstralio. Tiuj pri Nov-Zelando estas tre interesaj, kaj similas al turisma priskribo de tiu geografie diversa, historie tre unika, kaj socie tre sukcesinta lando. La nov-zelandanoj ĝuos legi pri si mem kion ili grandparte jam scias. Ekstras la priskribo de la renkontiĝoj de Sekelj kun jugoslavaj enmigrintoj en tiun landon. Pro tiuj rakontoj pri liaj vojaĝoj en tiu lando la libro tre valoras, por nov-zelandanoj kiel por eksterlandanoj.

La dekdu-rakonta parto pri Aŭstralio estas eĉ pli valora, kaj speciale por aŭstralianoj por lerni iom pli pri la historio kaj nuno de sia lando kaj speciale pri la indiĝenoj. Loĝinte kaj multe ĉirkaŭvojaĝinte dum pli ol sesdek jaroj en ĉi tiu lando, dum Sekelj pasigis nur kelkajn semajnoj en ĝi, mi devas konfesi ke, malgraŭ pluraj kontaktoj kun ili, mi sciis multe malpli ol li pri la aŭstraliaj indiĝenoj. Legi ĉi tiun libron, krom siatempe gastigi Tibor'on dum lia vizito al Melburno, estis do tre valore por mi, kaj pliiĝis miajn scion de kaj admiron al la aŭstrala popolo. Sed ankaŭ la priskriboj pri liaj renkontiĝoj kun jugoslavaj enmigrintoj estas ege interesaj, kaj mi do opinias ke legi ĉi tiun libron de Tibor, same kiel legi liajn aliajn verkojn, valoros por ĉiuj

Esperantistoj aŭstraliaj. Viaj esperoj realiĝos. Kompreneble la libro valoras ankaŭ por aliaj Esperantistoj, speciale la jugoslavaj, ĉar Tibor verkis la libron speciale por ili. Mi do varme rekomendas ĉi tiun verkon al la tutmonda Esperantistaro.

Malgraŭ la troa uzado de “je”, la stilo de la en-Esperantaj tradukoj el la originala teksto estas bonega, kaj enestas malmultaj gramatikaj eraroj. Bedaŭrindas la multaj nenecesaj kaj ne-Esperantecaj neologismoj kaj la manko de la pasivo per “-ati”. Same malagrablas malĝustaj sed kutimaj vortoj kaj la gramatike neblaj landvortoj per sufikso “-i-”. Sed multaj Esperantistoj ankoraŭ alkutimiĝas al tiuj pluraj malmodernaĵoj kaj tial ne ĉagreniĝos pri ili.

Mi esperas ke multaj samideanoj ricevos plezuron de la lego de ĉi tiu bonega verko.

Detaloj de la libro:

Originala titolo: *Kroz zemlju kengura.*

Redaktis: Josip Pleadin

Eldonis: Dokumenta Esperanto-Centro, Durdevac, 2015

Se vi volas mendi ĉi tiun libron, la kosto estas \$15.00 inkluzive de la poŝtkosto. Kontaktu Heather Heldzingen ĉe heather@melburno.org.au.



Nur alportu vin mem

JOANNE JOHNS (MELBURNO)

La teleroj alvenas per malregula pulso
kisante la plastan tablotukon,
kiun ili ne vidis ekde la kvardekan naskiĝtagon de Johano.

Kelkaj estas vestitaj per blanka maŝaro
rezerve kaŝante siajn vizaĝojn
kontraŭ la muŝoj, kiuj amindumas ilin,

aliaj eksudas sensamecon,
volvitaj en striktaj, travideblaj vestaĵoj,
malkaŝante ilian emon por segila rando.

Ĉiuj el la kutimaj gastoj estas ĉi tie,
ŝvitante malvarmetajn bidojn kontraŭ la varmeco:

terpoma salato, kies edzo forlasis ŝin
por alia viro...

brasiksalato, kiu rifuzas kundividi receptojn,
kustardkuko, kies filo mortis pasintan monaton
survoje hejmen el festo.

Duobla ĉokolada torto kaj fruktokuko
baldaŭ rekomencas malnovan debaton
dum cezara salato kaŝe eliras eksteren por fumaĵo.

Bifstekoj kaj kolbasoj gluiĝas al la kradrostilo,
ĉirkaŭitaj de la simpleco de biero kaj sunbrilo.

Mensogoj, kiujn mi rakontis

JOANNE JOHNS (MELBURNO)

*Ĉi tiu estas magia balkono,
mi flustras malsupren al ŝi.*

**Mi drame turnas mian kapon
por kontroli ke ni estas solaj
(kvankam mi scias ke ni ja estas)
kaj klinas pli proksimen**

Se vi starus ĉi tie...

Mi staras tie, grava kaj sekretema

*je precize meznokto,
je la dua plenlumo
de iu monato, kiu havas tiun,*

**Mi gestas tiel,
kiel mi imagas ke sorĉisto gestus,**

*kaj kun malfermitaj okuloj,
flustrus, "lasu min tra!"
tiam malŝlosus la pordon ĉi tiel,*

**Ĝi sonas per metala klako,
kaj mi malrapide malfermas ĝin,**

*kaj sen kaŝobservanto,
paŝus eksteren ĉi tiel...*

**miaj nudaj piedoj etendiĝas zorge
al la ŝtoneta surfaco,
kaj ni paŝas tra la enirejo
al mia senverva griza balkono**

ĉio estas malsimila al ĉi tio!

**ŝi suspekteme rigardas
miajn malsanajn plantojn,
kaj mi komencas semi revojn:**

*ĉi tiu manrelo ne estas ĉi tie - ĝi sekvas
grandan marmoran ŝtuparon
kun dika, mola musko
tute kovrante la balustradon...*

*tie, kie tiu domo nun estas,
kaj tiu domo, kaj tiu ankaŭ,
estas bela ĝardeno, plena de floroj
kaj arbustoj, kaj heĝoj, kaj papilioj!*

**Kiaj floroj? Ŝi demandas,
kaj mi nomas ĉiujn specojn, kiujn
mi povas pripensi.**

*Preter la ĝardeno, tie,
estas arbaro - sed ne kiel niaj arbaroj -
ĝi estas pli verda, pli dika kaj plenplena
de multaj strangaj kaj amikaj estaĵoj.*

*Mi renkontis feinon en tie iufoje,
mi diras, fingromontrante al la plej
malproksimaj tegmentoj,
ŝi kantis por mi kanton tiel belan
ke floroj ekfloris ĉirkaŭ ni por aŭskulti.*

**Mi daŭras fekundigi ŝian imagon,
korplene rememorante magian keston
el mia propra infanaĝo, kaj scivolemas
kiel miaj mensogoj kreskos.**

Anoncoj

69a kongreso de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)

16a ĝis 23a de julio 2016, Nitra, Slovakio

www.ikue.org/kong2016/aligilo2016ikue.pdf

66-a kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI)

16. - 23. 7. 2016, Bratislava, Slovakio

<http://keli.chez.com/Aligilo%20al%20KELI%20kongreso%202016%20-1.pdf>

La franca Esperanto-kastelo Grésillon en Francio invitas vin lerni kaj ferii.

- Apr-08/16: PRINTEMPaS, intensivaj kursoj kaj KER-ekzamenoj (B1, B2, C1)

- Apr-20/24: Korusa renkonto de Interkant' kaj verkadaliero Krajon'-Ankro

- Jun-12/17: La Luaro laŭ la vortoj, turisma semajno laŭ verkistoj

- Jul-04/15: Dektaga kurso pri la esprimo de la tempo en Esperanto

- Aŭg-06/13: SOMERAS, la Esperanto-studad-semajno post FESTO

- Aŭg-21/28: Festa semajno por infanoj, adoleskantoj kaj familioj

Kontakto: kastelo@gresillon.org, +33 2 41 89 10 34, aŭ rete gresillon.org/kontakto

www.nitra2016.sk



*Nova jarcento
novaj defioj!*

101-a Universala Kongreso de

ESPERANTO

23.-30.07.2016 Nitro, Slovakio

Solvoj

Respondoj al demandoj pri eŭropaj lingvoj:

La angla lingvo adoptis la sekvajn vortojn el la jenaj lingvoj (laŭ *Lingo: A language spotter's guide to Europe*): 1. Avalanche: Romanĉa, 2. Noodle: Germana, 3. Eiderdown: Islanda, 4. Ski: Norvega, 5. Moped: Sveda, 6. Cravat: Serb-kroata, 7. Robot: Ĉeĥa, 8. Plaid: Skota, 9. Steppe: Rusa, 10. Guitar: Hispana, 11. Butter: Greka, 12. Fetish: Portugala, 13. Manage: Itala, 14. Menhir: Bretona, 15. Smuggler: Nederlanda, 16. Corgi: Kimra, 17. Trousers: Irlanda, 18. Sauna: Finna, 19. Biro: Hungara, 20. Air: Franca.

K	O	M	E	N	C	O			E	D	U	K	O			S	T	U	D	E	N	T	O
A			K			R	A	N	D	O		O	K			K			R				B
N	A	J	B	A	R	O			Z				A	T	M	O	S	F	E	R	O		S
D			R					B	O		M		Z			L			N				K
E	N	L	I	T	I	Ĝ	I		J		I		O			T	E	N	I		P		U
L			L				N				R			P	R	O			L		R		R
O	N	D	O	J	N		T	E	G	M	E	N	T	O		J	O		O	K	U	P	I
J		E			O		E			I			R		B						N		
		N			V		R		P	R	O	M	E	S	O		F	R	U	N	T	O	J
A	Ŭ	T	O	M	A	T	E			I			Z	O	N	O			N		I		U
G		O			Ĵ		S	P	I	N	A	C	O		V		F		I				K
R	A	J	O		O		A			D			R		E	K	L	E	K	T	I	K	A
A				A						K	A	R	B	O		N		U		A			
B		A	K	T	U	A	L	A				R			O	L	E	A		A			K
L	A	Ŭ		E			I		E	S	K	A	L	O		A		L	I	V	E	R	O
A	Ŭ	T	E	N	T	A			S			S			N				I			L	
	T	O		T			E	N	T	U	Z	I	A	S	M	O		V	I	D	A	Ĵ	O
S	U	R	D	A			Ĉ		R			K		T				A		U			
	N	O				N		Ŝ	A	B	L	O	N	O		T	E	G	O	L	O		Ŝ
Ĥ	O		O	R	D	I	N	A	R	A				I		U		O		O		T	
E			M		R			F	O	R	M	O		K	A	N	O	N	O		A	V	O
M	E	M	B	R	O	J		I		O				U		I		A				R	
I			R		N			D		N			E	L	E	K	T	R	O	N	O		M
O	R	G	A	N	I	S	M	O		O	K	U	L	O		O		O		E	L	F	O



New Zealand Esperanto Association

P.O. Box 8140
Symonds Street
Auckland 1035
New Zealand

www.esperanto.org.nz
nzea@esperanto.org.nz
0800 350 781

Bradley McDonald | President

Ivan Pivac | Vice-President

David Ryan | Secretary/Treasurer

Committee Members:

Erin McGifford, Chris Krageloh, David
Dewar

NZEA's vision is for everyone in New Zealand to recognise the value of Esperanto as an international language.

NZEA is one of the oldest Esperanto associations in the world, and is responsible for promoting Esperanto in New Zealand, providing learning material, and answering queries about the language.



Australian Esperanto Association

Esperanto House
143 Lawson Street
Redfern NSW 2016
Australia

www.esperanto.org.au
info@esperanto.org.au
+61 (07) 4696 9293

Sandor Horvath | President

Jonathan Cooper | Vice-President

Heather Heldzingen | Treasurer

Esther Parris | Secretary

Committee Members:

Margaret Chaldecott, Joanne Johns,
Indrani Beharry-Lall

AEA was established for the promotion, education and use of the international language, Esperanto, in Australia.

AEA aims to make Esperanto available to help with intercultural understanding and harmony, and works to foster co-operation among Esperanto organisations with similar aims.

WHAT IS THIS?

Perhaps you've picked up this magazine by chance and you're wondering, what is this language? It looks like Spanish, doesn't it? But it's not, and it's not Klingon either. This magazine is written in Esperanto. Have you ever heard of Esperanto? Where is it spoken?

Esperanto is a planned language. It's not the official language of any country, but it's spoken in over 100 countries across the world. It's designed to be a second language that everyone can speak. So, if you come across someone from Mexico or Taiwan, you don't have to speak Spanish or Chinese, and they don't have to speak English to you. If everyone spoke Esperanto, we could talk together in Esperanto as equals and we wouldn't have to learn so many languages.

Esperanto is an easy language. Its grammar is regular. It can be learned in much less time than other languages. Have a look inside this magazine – you'll probably be able to make out a few words or get a general sense of some sentences. You can learn Esperanto on the net (we recommend lernu.net or duolingo.com), or from a book, or come to one of our meetings throughout Australia and New Zealand. Also go onto YouTube or Wikipedia. You'll find lots of material there in and about Esperanto.

What can you do with Esperanto once you've learnt it? Well, the world is your oyster. Get in touch with other people who speak Esperanto – chat with them online or go to a congress or cultural event. Even if you stay at home, there are hundreds of books and magazines either written in Esperanto or translated from other languages. There are music CDs, radio broadcasts, even films in Esperanto. People with similar interests who speak Esperanto also get together, such as cyclists, doctors, Rotarians, or coin collectors. There are plenty of opportunities to use Esperanto to communicate with other people throughout the world.

Esperanto will open the world to you – beyond our usual English-language confines.

Interested? See the contact details on the inside back cover.